

Walter Stempell,
 Monasterkanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Kara urbo en tilia
 Kron', ornam' de Vestfali',
 Metu sur remparo via
 Vian urb-standardon vi.
 Brilu ĉiam kun fiero,
 Ardu la tilio-flor';
 Restis juna, Monastero,
 Via rebaptista kor'.

La zigzagaj dom-frontonoj,
 Freŝa rido de knabin',
 Krome sonorilaj sonoj,
 Tio bone rimas sin.
 Sonas inter la urb-muroj
 Rido kaj mallaŭta kri',
 Brilas la malnovaj turoj,
 Ofte vidis tion ĉi.

Kiam jen en lun-radio
 Lumas la urb-katedral',
 Fantomadas kaŝe io
 Tra l' malnova urbo-hal'.
 Dum disput' de l' kontrahentoj²
 Batas la horlog' de l' tur',
 Gaje kantas la studentoj:
 "Gaudeamas igitur".

...

²aŭ:

Kaj studentoj jen promenas,
Indaj pastroj en ornat',
Ankaŭ belaj inoj venas
Al la universitat'.
Malgraŭ grizo kapharara
Daŭre restas juna ĝi,
Tiu muzoplana kara
Aŭro de l' akademi'.

Monastero, urbo bela,
Floru ĉiam kun kreskem';
Kiu nomis vin malhela,
Estis malhelulo mem.
Via sonoril-sonado,
de l' virinoj la belec',
Gaja la student-kantado,
Daŭru ĝi en estontec'!

...

Dum disput' de l' kontrahentoj
Aŭdas horloĝ-baton ni,
Gaje kantas la studentoj:
"Ĝoju ni pro tio ĉi".

La vorto "kontrahento" estu studenta esprimo, kiu signifas "kontraŭulo en disputo", laŭ la germana, latin-devena, esprimo "Kontrahent".

Kiu ne kun Monastera
Knabineto iris tra
Tiu urbo, ano vera
De la urb' ne estis ja.
Kiu ne en Monastero
Trinkis glason da bier',
Tiu estis ja en vero
ne student' en Monaster'.

*Traduko de la Germana poemo "Münsterlied" de WALTER STEMPELL (†1938) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-295-598 (2005-02-21 10:29:43)